NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4°.29012 Madrid
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz Februaro 1993
*******************************************************************

UK DE VALENCIA. NORMAS DE INSCRIPCION

1.- Para residentes en España existe una hoja de inscripción con el precio en pesetas a ingresar en la cuenta bancaria del congreso en Valencia. CAJA DE AHORROS DE VALENCIA, urbana Sorolla, n° 2077 0063 59 3101696422 a nombre de 78a Universala Kongreso de Esperanto.Cuotas para españoles **hasta 31 de marzo**: No socio UEA: 21000 pts. Socio UEA: 16800 pts. Acompañante y joven no socio UEA: 12500 pts. Acompañante y joven socio de UEA: 8400 pts.

2.- Enviar hoja de inscripción y fotocopia del ingreso a: U.K de Esperanto.Gran Vía Fernando el Católico 45. 46008 Valencia.

3.- La inscripción es más barata si se es socio de UEA en categoría MJ, aún pagando la cuota anual de inscripción de socio. Para hacerse socio en esta categoría hay que transferir 1.760 pts (cuota de 1993) a la cuenta de Juan Azcuénaga, CAJA POSTAL cta. n°03548531. Posteriormente enviar datos personales y resguardo de ingreso a J.Azcuénaga. Gral. Dávila 127 P.7.39007 Santander.

OJO, NO EQUIVOCARSE DE CUENTA: inscripción a Valencia, cuota de socio UEA a Azcuénaga.

**ALOJAMIENTO: en colegios mayores desde 48 florines (x 60pts) con pensión completa.**

UNUA HISPANA ESPERANTO-KURSO EN TELEVIDO

Ekde Oktobro en la TV-Sabadell oni elsendas, katalunlingve, Esperanto-kurson (vendrede je la 23-a). Daŭros 180 minutojn kaj ĝi konsistos el 12 lecionoj. Post la tuta elsendo de la programo, la kurso estos vendota en video-VHS.

ADRESARO DE HISPANAJ ESPERANTAJ GRUPOJ

La adresaro eldonita de MEL, laŭ ideo kaj kunordigado de Lupe, en oktobro-92, atingis grandan sukceson kaj kelkaj esperantistoj petis kopiojn (kontraŭ 100 ptj en poŝtmarkoj). MEL dankas komentariojn kaj sugestojn ricevitajn kiujn oni inkludos en la venonta eldono. **GRAVA ERARO** la kont-numero de J.Azcuénaga ĉe Caja Postal estas 035448531.

VORTARO PRI EKONOMIO

En la katalogo de la eldonejo Espasa-Calpe aperas "Internacia vortaro de komerco kaj ekonomio" eldonita en Pekino en jenaj lingvoj: angla, hispana, germana, franca, itala, portugala kaj ESPERANTO.

N I A  V O Ĉ O
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.  28012 Madrid
Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz  Januaro 1993

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

(Nia voĉo oferas siajn paĝojn al HEF-CO por centrigi **madridajn** esperantajn informojn kaj faciligi kontaktojn kun Esperantaj grupoj kaj madridaj esperantistoj pere de revuo pli ofta ol Boletin. Bedaŭrinde de HEF-kunveno kiu okazis en Madrido, datita 93-01-16, neniu sendis resumon al nia redaktejo, eble aperos en "Boletín"

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en la sidejo de MEL, Atocha 98
Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h.labortagoj en HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13)
Madrida esperantistaro atendas reinaŭguron de HEF-CO kiu jam havas **fakson kaj komputilon**.............MEL oferas ŝaŭman vinon.!!!

Venontaj prelegoj, lunde je la 19.00h en Atocha 98-4°:

**15-an februaro. Mamen Dávila: "Somera aventuro en Kenio"**
15-an marto. Jorge Camacho: "La dek pli belaj vortoj de Esperanto"

BALDAŬ ESPERANTO HISPANE

MEL kaj la Ministerio pri Kulturo subvenciis la eldonon de la hispana versio, fare de Marcos Cruz, de la libro "La fenomeno Esperanto" verkita de William Auld. La hispana titolo estas "Esperanto: Fenómeno de la comunicación". Vendo-prezo 1.300 pesetojn (inkludas sendokoston al Hispanio). 20% rabato se vi aĉetas 5 ekzemplerojn. ANTAŬPAGO NECESE pere de POŜTĜIRO al Esperanto-Liceo de Madrid. Atocha 98-4°. 28012 Madrid. NE SENDU ĈEKON.

**VI JAM POVAS KONTAKTIGI FAKSE KUN HEF-CO**
**FAKS- kaj telefonnumero (91) 446 80 79**

ESPERANTO ĴURNALE

Kelkaj ĵurnaloj dediĉis artikoletojn al vortoj de Umberto Eco apogante Esperanton (El Adelantado de Segovia 92-12-08), kaj ne nur en Hispanio, ankaŭ en Italio S-ro Eco deklaris ke Esperanto povus esti Europa interlingvo.
Ankaŭ la segovia ĵurnalo publikis artikoleton de Cesar de Mosteyrín, okaze de la Zamenhofa tago: "La esperanza del idioma" (92-12-16). Kvankam kiel ofte la teksto estis iomete modifita.
La revuo Monato eldonis preskaŭ unu paĝon sendita de Juan Navareño pri diversaj gramatikaj vidpunktoj. Juan ne apogas la uzadon de supersignaj literoj pro ilia malfacileco kiam oni skribas maŝine. J.Camacho daŭrigas en Kontakto sian kontribuon "Ami kino".

**KOTIZO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO POR 1993**

**La kotizo por tiu ĉi jaro estas sama ol 1992. Bv. sendi ĉekon po 2.000 ptjn, se eblas antaŭ la 31-an de marto, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭdankon por via kontribuo al daŭrigado de MEL.**

HUMORA DESEGNO PRI ESPERANTO

Aliafoje humora desegnisto sendis kontribuaĵon por eldoni, se eblas, en kongreslibro de Valencia Kongreso. Dankon KALIKATRES pro la babela turo.

ASAMBLEO DE MADRIDA ESPERANTO-LICEO

La 25an de januaro okazis generala ordinara asembleo. En aparta folio oni eldonas protokolon kun resumo de la diskutitaj tag-ord-punktoj.

DANKON "Verda stelo"

La koruso "Verda stelo", kiu provas en la sidejo de MEL, kontribuis en 1992, pere de 175.000 pesetojn al elspezado de MEL kaj promesis por 1993 kvanton egalan al duono de fiksajn elspezojn.